WIKIPEDIA

Bretona lingvo

La **bretona lingvo** (ISO 639 : ISO 639-1 *br*, ISO 639-2 *bre*; propranome ***Brezhoneg***) estas hindeŭropa lingvo, en la kelta familio de lingvoj, parenca de la kimra.

Bretona lingvo	
Brezhoneg	
Parolata en	Bretonio (Francio)
Parolantoj	206 000
Denaskaj parolantoj	proksimume 200.000
Skribo	latina alfabeto
Lingvistika klasifiko	
Hindeŭropa	
Kelta	
Britona	
Bretona	
Oficiala statuso	
Reguligita de	Ofico Publika de la Bretona
Lingva statuso	4 severe endanĝerigita
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	br
ISO 639-2	bre
ISO 639-3	bre
SIL	bre
Glottolog	bret1244
Angla nomo	Breton
Franca nomo	breton
Vikipedio	

Enhavo

Priskribo
Specimeno
Vidu ankaŭ
Bildaro
Bibliografio
Eksteraj ligiloj

Priskribo

La bretona estas parolata en la okcidenta parto de la regiono Bretonio (nordokcidente de Francio) sed ĝi ne havas oficialan statuton. Tamen, oni konsideras ke plimalpli 200,000 personoj uzas ĝin, aŭ almenaŭ kapablas kompreni ĝin. La lasta unulingva parolanto mortis en 2002. (estis la sinjorino Bourdonnay, kiu sciis saluti kaj diri kelkajn frazojn en la franca, sed ne pli)

La bretona uzas latinan alfabeton. Supersignitaj literoj estas **ñ** kaj **ù**. Krome **c** ne aperas kiel memstara litero sed ĉiam sub la formo **ch** aŭ **c'h**.

La bretona lingvo enhavas kvar dialektojn, respondantajn al la kvar malnovaj episkopujoj de okcidenta Bretonio :

- Bro-Leon (*Léon* en la franca)
- Bro-Gerne (*Cornouaille*)
- Bro-Dreger (*Tregoro*)
- Bro-Wened (*Vannetais*)



En koloro, la diversaj dialektoj de la bretona lingvo. La griza parto estas la nuna zono de la franca lingvo kaj la gaŭla lingvo.

La plej malnova trilingva vortaro estis la *"Catholicon"*, vortaro bretona-franca-latina, eldonita en 1464.

Specimeno

> *Mellad unan Dieub ha par en o dellezegezh hag o gwirioù eo ganet an holl dud. Poell ha skiant zo dezho ha dleout a reont bevañ an eil gant egile en ur spered a genvreudeuriezh.*

Vidu ankaŭ

- Bretonlingva literaturo
- Bretonoj
- Lingvistiko
- Listo de lingvoj
- Anna Muradova

Bildaro

Bibliografio

- Ar Menga, Erwan 1978 : *Deskomp Esperanteg*, Hor Yezh, Douarnenez, 3 volumoj

Eksteraj ligiloj

- Oficejo de la Bretona Lingvo (bretone, france, angle) (http://www.ofis-bzh.org)
- Kervarker : Portalo pri bretona lingvo (bretone, france, angle, hispane, germane) (http://www.kervarker.org)
- TTT-ejo pri la "Catholicon" (bretone, france, germane, angle, hispane, itale, nederlande, portugale) (http://www.catholicon.net)
- Skolius - Geriadur ar skoliataer : bretone-france (http://www.skolius.com)
- esperante Britujo: Scilly-insularo estas eta paradizo (https://uea.org/vikio/Britujo:_Scilly-insularo_estas_eta_paradizo) en **retgazeto** Nia Mondo (https://uea.org/vikio/niamondo)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Bretona_lingvo&oldid=6780183"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 22:02, 9 nov. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.